

Klaus Groth,  
Vintra amo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La prujno pendis en tili',  
tra kiu fluis luma hel';  
vidiĝis via dom' al mi  
samkiel fe-kastel'.

Tra la fenestro vidis mi  
en via ĉambro stari vin;  
en la sunbrilon paŝis vi,  
malhela vi fein'!

Printempan varmon sentis mi;  
sed tuj min memorigis la  
frosteca man-salut' de vi,  
ke estis vintro ja.

*Traduko de la Germana poemo "Winterliebe" de KLAUS GROTH (\*1819-04-24 - †1899.06-01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-02-28.*

MR-071-2 / Arg-586-1181 (2012-12-30 18:42:36)

*La poemo troviĝas ankaŭ en [http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/vintra\\_amo.html](http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/vintra_amo.html).*